# *La kubaj boksistoj revenis kun la ?ampiona pokalo.*



Miguel Díaz-Canel Bermúdez, la unua vicprezidanto de la ?tata konsilantaro akceptis en Havano la ?ampionistojn de boksado kiuj revenis al la insulo post partopreni la IV-an mondan mat?on de tiu sporto en Bakú.
La kuba vicprezidento dialogis kun la boksistoj elvokante ilian agadon kaj gratulis ilin pro la sukceso kaj la ebleco ke la kubaj amantoj de tiu sporta disciplino sentu sin ?ojaj pri tiu venko.
La kuba teamo konata kiel *Domadores*, debutis en tiaspeca evento per venko de 6-5 en konkurso por la titolo kontra? la partnero, Bakú Fires de Azerbaj?ano dum la lasta semajnofino.
Meze de malfacila scenejo, pro manko de garantioj por disputi en ne?trala kadro, la boksistoj kaj teknikistoj ne povis solvi la disputon je la fino de la mat?o en la 10 divizioj kreitaj, ili devis ili al ekstra boksado en la divizio de 69 kg. Tiamaniere Kubo sukcesis gajni la pokalon de la ?ampionludo.
Díaz-Canel emfazis ke “estas gravega momento por nia boksado, kiu demonstris posedi solidan skolon. Vi meritas la rekonon de nia popolo kaj anka? la teknikan stabon”, li asertis.
“Nun vi devos forte labori ?iutage por plibonigi la necesajn plibonigendojn por partopreni la venontajn centramerikajn kaj karibajn ludojn, kaj estonte vi certe havos novajn batalojn en novaj konkursoj”, li emfazis.
Nome de la boksistoj, Julio César la Cruz esprimis sian” kontenton kaj fidon ekde la unua momento spite al la komplekseco de la turneo kaj pro ilia kondi?o kiel debutantoj en tiaspecaj eventoj, sed ili ?iam eliris por ser?i la venkon”.

La teknika estro de la teamo, Rolando Acebal esprimis ke ili intencas redoni al la kuba skipo la solidecon de pasintaj epokoj ne tiom foraj, kaj ne spekulacii fronte al la nunaj rezultoj, “ni avancadis, jes ja, sed ankora? la vojo estas longa por atingi pli altan nivelon en ?iuj divizioj”, li asertis.
“Ni forte laboros, ne eblas resti kontentaj pri la nunaj rezultoj, sed la boksado en Kubo revenas kun alta moralo sporta, pri tio ni estas konvinkitaj”, li fine emfazis.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/25361-la-kubaj-boksistoj-revenis-kun-la-campiona-pokalo

Radio Habana Cuba